



Pos-Amiko

Printempo 2021, numero 36

Pensu pri aliaj homoj, restu hejme kaj havigu la gazeton!

INDEKSO:

1. UEA enspezas milojn per fuŝa pagsistemo
1. LF publikigas veron
2. Varbi Esperanton bonas por la sano
2. Pli modernaj programeroj por IJK
2. Retoso subvencias retkonektojn
3. Kara Koko
3. NEJ-Novaĵoj
3. Horoskopoj

4. EVENTOJ

KOLOFONO

Pos-Amiko estas eldonaĵo de NEJ kaj aperas kvarfoje jare.

Redaktoro: Koko Poso

kkps.klackunveno@gmail.com

[http://kkps.esperanto-](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

[jongeren.nl/Pos-Amiko](http://kkps.esperanto-jongeren.nl/Pos-Amiko)

UEA enspezas milojn per fuŝa pagsistemo

La reta renkontiĝo Retoso de TEJO estas grava momento por la organizantoj, por aktivuloj kaj membroj de TEJO, sed ĝi ankaŭ estas signifa okazo por la membroadministrado de UEA. Ĉar partopreno en Retoso estas senpaga por membroj de TEJO, multaj homoj provis por la unua fojo membriĝi en tiu ĉi monato, uzante la antikvan retpaĝon de UEA. Tio ne iris glate por ĉiuj.

Multaj novuloj, nekonante la fuŝan staton de la sistemo aŭ nepre ne volante maltrafi la retan okazaĵon, multfoje provis sendi pagon. Tamen ĉiuj provitaj pagoj bone alvenis, nur mankis konfirmo, kiun oficistoj en la

Centra Oficejo mane devas skribi dum laborhoroj post la kafaŭzo. La tiel ĉi gajnitaj aldonaj pagoj verŝajne sufiĉos por vivteni la asocion almenaŭ du pliajn jarojn.



Foto de kasisto de UEA

Libera Folio publikigas veron

En tute ŝoka movo je la 1-a de aprilo 2021 la konata satira retpaĝo Libera Folio publikigis tute veran artikolon pri la nova retpaĝo de UEA. La retpaĝo taksas la situacion sufiĉe absurda en si mem sen la bezono elpensi ŝercon.

Varbi Esperanton bonas por la sano

La Monda Organizaĵo pri Sano ĉi-monate oficiale aldonis ‘Varbi pri Esperanto’ al siaj rekomendoj por fari dum la pandemio. En tiu listo troviĝas diversaj rekomendoj kiel ‘lavi manojn’, ‘kovri buŝon kaj nazon’ kaj ‘aŭskulti sciencistojn’. La nova aldono estas pro ĝia pruvita utilo por distancigi homojn. Diversaj studoj montras rapidan kaj fortan reagon al ajna varbado pri Esperanto, plej ofte per tuja distanciĝo for de la varbanto. Pro tio ĝi tre taŭgas por instigi al socia distancado, eĉ en kutime tre sociaj okazoj kiel festoj aŭ diskutoj.

La konsilo kompreneble ne taŭgas en la kunteksto inter jamaj esperantistoj. Por tio la MOS rekomendas peti kontribuojn al la realigplano de TEJO.

Pli modernaj programeroj por IJK

Esperantlingvaj kanaloj en Jutubo spertis grandajn komunikajn sukcesojn en 2020, kaj iliaj sukcesoj invitas imitadon. Tiel opinias ankaŭ la ĉefrespondeculo pri programo de la IJK 2021. Dum la kieva IJK la averaĝa daŭro de programeroj estos malpli ol dek minutoj, kaj ĉiu programero finiĝos per alvoko aboni la preleginton. Krome laŭplane estos subtekstoj en Esperanto kaj la angla por la tuta programo, kaj jam dum la prelego oni invitos la spektantojn skribi siajn komentojn sur skribtabulo.

Same kiel en popularaj jutubaj kanaloj almenaŭ unu el tri programeroj temos pri gramatikaĵoj, sed tio ĉi ne signifas ajnan ŝanĝon kompare al antaŭaj kongresoj.

Retoso subvencias retkonektojn

La nova tutmonda reta renkontiĝo Retoso ne nur estas senpaga por TEJO-membroj, ĝi eĉ subvencias retaliron por iuj partoprenantoj, kiuj havas malfortan retkonekton. Origine la teamo planis nur repagi kostojn de retkafejo, sed la planoj iom ampleksiĝis.

Du grandaj kabloŝipoj transiris la marojn dum monatoj por kuŝigi rapidegajn vitrofibrajn kablojn inter Roterdamo kaj Manilo, kaj inter Roterdamo kaj Havano. Retoso-kasisto Snehaĝa Venkatesh komentas: “Tio eble estas investo de kelkcent milionojn da eŭroj, sed ni certe regajnos tion per kotizoj, membriĝoj kaj patroniĝoj. Gravus por ni liveri laŭeble plej bonan sperton por la partoprenantoj.”

Kara koko...

“Kiel vi enspezas monon? Mi ĉiam ricevas la Pos-Amikon senpage.”

Kara homo,

Kvankam la profesio de ĵurnalisto estas ĉiam ekscita kaj glorprena, gajni monon ne estas garantiita dum la serĉado de la vero. Tial mi ekhavis duan laboron, en kiu miaj komunikaĵaj kapabloj kaj organiza talento ankaŭ utilas: mi organizas internaciajn Esperanto-renkontiĝojn. Tamen mi ne nomos ilin ĉi tie, ĉar mi ne volas endanĝerigi la neŭtralecon kaj objektivitecon de la Pos-Amiko.

Poso

Skribu viajn demandojn al

kkps.klackunveno@gmail.com

NEJ-Novajoj!



Aliĝu al la IJK-teamo

Post iom pli ol jaro en Nederlando okazos granda, mojosa IJK! La planoj de IJK 2020 estas plejparte reuzeblaj, sed la organiza teamo bezonas iom da freŝa homforto. Spektu ĉe <https://mallonge.net/organizu> la alvokon kaj kandidatiĝu!

LA HOROSKOPO

Ŝafo: Ĉu vi jam havas propran konspiriteorion? Ne maltrafu la modon!

Taŭro: Se vi vere ne scias kion fari, eble kandidatiĝu por TEJO-estraro.

Ĝemeloj: Se vi ankoraŭ ne vendis renon, ĉu vi vere subtenas TEJO-n?

Kankro: Vi ne membriĝis en TEJO kaj pro tio vi ne legas tiun ĉi frazon.

Leono: Vi venkos.

Virgulino: Post interfaka simpozio vi ne plu estos.

Pesilo: Ne zorgu, babileja seksumado ne povas kaŭzi denaskulojn.

Skorpio: Vi renkontos ĉarman babilroboton en retvendejo.

Antonia: Ne paniku, vi ne havas tempon por tio!

Sagitario: Pli bone fidu je horoskopo ol je statistiko.

Kaprikorno: Vetu kun amikoj pri la komenco de sekva epidemia ondo!

Akvisto: Ne forgesu foje dormi anstataŭ homlupludi.

Fiŝoj: Ne metu tro altajn celojn: lavi unu denton ankaŭ estas progreso.

Venu al la KKPS en Ravnsø, Danio en 2021!

Koko Poso solas en kvaranteno nun jam de longa tempo. Li tiom antaŭĝojis revidi vin ĉiujn en oktobro de 2020, sed laŭ li la dana registaro ne kredas je kokaj rajtoj kiam ili refermis Danion kaj devigis la organizan teamon nuligi la KKPS.

Bonŝance por Koko Poso, DEJO denove klopodas okazigi KKPS en 2021. Estas la sama koncepto, sama loko kaj preskaŭ la samaj datoj!



Aliĝu jam nun ĉe kkps.esperanto-jongeren.nl!

Ni festos halovenon en ujutna nederlandana etoso en arbaro meze de nenie en Ravnsø ĉe Ry en Danio. Ni ekskursos al la plej proksima ~~monte~~ monteto, la Ĉiela Monto, kiu estas plene grimpebla eĉ kun valizo en la mano.

Krom la nederlandaj kutimaĵoj kiel duontaga ekskurso, halovena balo kaj noktaj manĝoj estos ankaŭ danaj tradicioj kiel gløgg, æbleskiver kaj biero kontraŭ malpli ol eŭro ($\approx 7,46$ kr).



Koko kunportis al Danio grandan stokon de Stroopwafels de Albert Heijn, per kiuj li plenigas la truojn en sia animo kaj stomako. Nun pasis du jarojn kaj li bedaŭrinde iom dikiĝis.

Venu al la KKPS en Ravnsø ĉe Ry, Danio, inter la 30-a de oktobro kaj 1-a de novembro en 2021.

Aliĝoj antaŭ la 1-a de aŭgusto profitos la plej malmultekostan aliĝperiodon.



Ne estu koko, venu al la KKPS!